Esperanto por mi

16 geesperantistoj

portretitaj de HELGA PLÖTNER


Portretoj 2
表紙.docx

11



HORIZONTO

1. Raia ANDROVSKA (Bulgario)



Mi naskiĝis en junio 1969. Mi kreskis kaj havis feliĉan infanecon en tiam socialisma Bulgario en urbo Vraca. En mia urbo estis Esperanto-klubo ekde 1906 kaj agadis tre aktive esperantistoj, dank' al kiuj mi lernis rapide la internacian lingvon kaj mi tuj eniris la nacian kaj internacian Esperanto-movadon.

Mia unua UK estis tiu de Havano, Kubo, en 1990. Mi estis 21-jara, kaj mi loĝis en la ĉefurbo Sofio en grandega ekonomia kaj socia krizo de politika ŝanĝo. Tiam mi unuafoje vojaĝis sola al eksterlando. Feliĉe ĉio iris glate kaj mi havis bonegan sperton. Oni eĉ intervjuis kaj filmis min por la Kuba Televido.

Poste mi fariĝis tre aktiva esperantistino. Mi kunorganizis IJK-on en mia urbo Vraca en 1993 kaj samjare mi volontulis dum la UK en Valencio, Hispanio. Mi partoprenis en multaj internaciaj junularaj eventoj en diversaj landoj, diplomiĝis per diplomverko pri Esperanto en la universitato kaj organizis karavanojn al alilandaj renkontiĝoj.

Tamen pro familiaj kialoj mi devis rezigni mian aktivecon kaj preskaŭ malaperis de la Esperanto-movado dum 25 jaroj. Tamen de la lastaj 8 jaroj denove mi plene dediĉas min al Esperanto.

Esperanto donas al mi la plej bonajn: geamikojn, amuziĝojn, spertojn, sciojn, travivaĵojn, vojaĝojn kaj mondpercepton. Ĝi donas al mi ankaŭ eblecojn evoluigi min kiel homo kaj malkovri kaŝitajn talentojn en mi kaj en la aliaj. Ĝi tenas min juna, scivolema, entuziasmoplena. Esperanto fariĝis la senco de mia vivo.



Kun Roman DOBRZYŃSKI kaj Barbara PIETRZAK dum la Krakovaj Esperanto-Tagoj en Krakovo, Pollando, en junio 2024.

2. Olga BAUER (Skobeeva) (Ukrainio)



Olga BAUER (Skobeeva) UKRAINIO, Helga Blöhmer 2026

Mi naskiĝis en oktobro 1961 en Jalto, Krimeo, Ukrainio. Pro la rusa agreso kontraŭ Ukrainio, mi estis devigita migri, kaj nun mi loĝas en okcidenta Ukrainio.

Miaj laborspertoj estis turismaj agadoj, bibliotekistino, fondinto kaj estro de publikaj organizaĵoj "Espero" ktp.

Mi studis Esperanton en Jalto en 1982, en la tempo de la totalisma soveta reĝimo, kaj Esperanto fariĝis por mi "la vojo al libereco kaj unueco kun samideanoj". Danke al Esperanto, mi partoprenis Esperantajn renkontiĝojn en diversaj respublikoj: Litovio, Latvio, Armenio, Kartvelio, Ukrainio ktp. Mi partoprenis en produktadoj de la Esperanta Teatro.

En 2014 ni fondis la interkulturan festivalon "Lingva Fest" en Ĉernivco kune kun Ukraina Esperanta Asocio. En ĝi reprezentantoj de diversaj naciaj komunumoj kaj eksterlandaj studentoj rakontas pri naciaj lingvoj, alfabetoj, kulturoj kaj artefaritaj lingvoj.

Esperanto ĉiam estis mia helpanto en la vivo. Danke al mia scio pri Esperanto, mi ricevis laboron en 1990 ĉe la Palaco de Infanoj kaj Junularo kiel instruisto de Esperanto. En tiuj jaroj USSR estis fermita lando kaj nur danke al Esperanto "la pordoj malfermiĝis": laŭ invito de esperantistoj el Slovakio, Pollando, Bulgario, Hispanio, Germanio, kune kun la infanoj, ni partoprenis en Esperantaj renkontiĝoj en diversaj landoj de Eŭropo.

Esperanto estas tre grava en mia vivo: kunvenoj de la Reta Klubo "Geamikoj" fariĝis fidinda subteno por mi. Partopreno en la publikaĵo "Literatura Vivo" permesas al mi rakonti pri la vivo kaj lukto de ukrainaj virinoj. Partopreno en UK-oj kaj renkontiĝoj kun amikoj resanigas mian animon kaj donas al mi forton por helpi al aliaj.



Virina Esperanto-grupo, februaro 2026, en la montaro Karpatoj en Ukrainio.

3. Zdravka BOYTCHEVA (bulgardevena eŭropanino)



Mi naskiĝis en la tre bela bulgara urbeto Veliko Tarnovo. En mia lando kaj familio la muziktradicioj havis tre fortajn radikojn. Mi kresktis en tia muzikmedio, kaj post la fino de miaj muzikstudoj, mi ekaktivis kiel ĥorestrino. Sed eĉ la tre riĉa socia kaj kultura vivo en Sofio ne sufiĉis al mi. Mi deziris malkovri aliajn kulturojn kaj valorojn, kaj transiris al Francio.

Alvenante en Parizon, mi enskribiĝis en la Universitaton de Sorbono por sekvi kursojn pri mastrumado de la muziko. Je la fino de miaj studoj, mi instaliĝis en vilaĝo duone en Francio/duone en Svisio kaj tio permesis al mi rapide enplektiĝi en la svisan kulturan medion. Dum 15 jaroj mi horestris plurajn ĉiuspecajn svisajn korusojn.

20 jarojn poste, mi translokiĝis al Luksemburgo; sed fakte, mi dirus pli, ke nun mi vere loĝas en Esperantujo pro tri kialoj: unue, jam de pli ol dek jaroj mia hejma lingvo estas Esperanto, uzata kun mia dandevena edzo Jimmy, due, miaj plej bonaj lokaj amikoj estas esperantistoj, kaj trie, Luksemburgo estas lando, en kiu loĝas 170 nacianoj, kaj tiel mi sentas min kiel en Esperantujo.

Pri Esperanto, dum la unua periodo mi ĉefe aktivis en la junulara movado kaj la bulgara kaj internacia. Dum la dua periodo mi aktivis/as en mia profesia sfero – la muziko. Kun mia edzo mi fariĝis dumviva membro de UEA, partoprenis ĉiujn UK-ojn kaj pasintjare, mi estis elektita en la Estraro de UEA pri kulturo kaj eldona agado. Tre feliĉe, ankaŭ nia filino Linda multe kontribuis por la kulturaj programeroj dum la UK-oj.

Ni estas plene konvinkitaj, ke Esperanto estas la plej taŭga komunikilo en periodo de granda tutmondiĝo, en kiu la malpligrandaj kulturoj kaj socioj nepre devas defendi siajn poziciojn por pli bone konservi sian identecon kaj eĉ ekzistadon.



Internacia Arta Vespero en la UK, Burno, 2025

4. Miguelángel BUENO ÂVILA (Hispanio)



Mi naskiĝis en Salamanca, Hispanio, la 20-an de marto 1965, kaj mi loĝas en la vilaĝo Puente Villarente, León, apud la Vojo de Santiago Kompostela, kie pilgrimantoj el la tuta mondo trairas, kelkaj el ili esperantistoj.

Mi studis en la universitato de mia urbo, Salamanca, Teologio kaj Filozofio. Mi estis entreprenisto en grafikaj artoj, kaj bonsanĉe mi jam emeritiĝis.

Mi nur parolas mian denaskan lingvon kaj Esperanton, malgraŭ ke mi studis plurajn. Dum la juneco mi estis ĉef-skolto, vizitante kelkajn eŭropajn landojn kaj ĝuante multe da aventuroj.

Mi esperantiĝis en 2009-a. Mia ekscio pri Esperanto estis hazarda kaj mi trovis ĝin facila, ĉar ĝi similas al mia lingvo. De tiam mi partoprenis en pluraj UK-oj kaj landaj kongresoj.

Mi faris kaj faras diversajn filmetojn pri Esperanto-kantoj kaj Esperanto-literaturaĵoj, kiujn vi povas spekti en mia jutuba kanalo:
Miguelángel Bueno Ávila - YouTube

Mi estas membro de la esperantista grupo "Geamikoj" ĉe Telegramo. Ni uzas Zoom por paroli en Esperanto unufoje semajne kaj subteni internacian amikecon. Ankaŭ mi korespondas kun diversaj esperantistoj de diversaj kontinentoj per la retpoŝto kaj mesaĝiloj.

Mi opinias pri Esperanto, ke ĝi estas facila kaj kreiva lingvo, sen ideologiaj kaj geografiaj limoj. Gi estas gvidilo por la paco, respekto kaj kompreno de la homaro. Ĝuu Esperanton!... kiel mi, kune kun samideanoj...


En UK en Burno 2025 dum bankedo, kune kun Olga kaj Evelin.

5. Jindřiška DRAHOTOVÁ (Ĉeĥio)



Mi naskiĝis en 1938. Mi studis en medicina lernejo dum tri jaroj. Estante jam 17-jara, mi eklaboris en hospitalo. Tre baldaŭ mi edziniĝis. Mi laboris dum 7 jaroj en diversaj postenoj, kaj poste fariĝis ĉefflegistino kaj laboris en sama posteno dum 40 jaroj. En 1998 mi divorcis kaj komencis vivi tute alian memstaran vivon. En 2003 mi emeritiĝis.

En 1989 mi feliĉe trovis Esperanton, kiun mi eklernis sola per korespondaj lecionoj. Post tri monatoj mi komencis trovi eksterlandajn amikojn kaj mi vizitis ilin kaj mi gastigis ilin. Mi baldaŭ komencis instrui la lingvon, komence en liceoj, poste en bazaj lernejoj, en urba biblioteko kaj nun en urba klubejo.

Multan tempon mi dediĉas al tradukado de klasikaj Esperantaj verkoj al la ĉeĥa lingvo, esperante, ke la publiko sciu avantaĝojn de nia internacia lingvo. Mi tradukis proksimume 30 originajn Esperantajn verkojn. Nur kelkaj estis eldonitaj libre, ekzemple „IIi Vivis sur la Tero“ de geedzoj Robineau, „Bona Espero“ de Roman Dobrzynski, „Maskaredo ĉirkaŭ la Morto“ kaj „Robinsonoj en Siberio“ de Tivadar Soros kaj „Afrika misio“ de Jules Verne.


Mi daŭrigas rete eldoni broŝuron „Legaĵoj por amikoj“ du-foje jare (ĝis nun 17 volumojn), temantaj pri tradukoj el la ĉeĥa, verkoj de esperantistoj, versoj, informoj kaj distraĵoj. Ĉiu volumo havas 100 paĝojn.

Kiam mi rakontu pri vivo, homoj kaj Esperanto, mi aŭdacas kredi, ke nia lingvo iam plenumos taskojn, kiujn atendis Ludoviko.



Mi prelegas pri Esperanto kaj Esperanto-libroj.

6. Alois EDER (Aŭstrio/ Germanio)



Mi naskiĝis en 1940 en la federacia lando Salzburg de Aŭstrio, kiel tria infano de infanriĉa montara farmbienula familio.

Frue mi lernis, ke la kunhelpado de ĉiuj familianoj necesas por la bonfarto de la tuta familia komunumo en niaj neriĉaj kondiĉoj. La limigita horizonto en nia montara valo vekis mian scivolemon pri la ekstera parto de nia mondo.

La eklezio stipendiis al mi la loĝadon en internulejo por viziti gimnazion en la 100 kilometrojn fora urbo Salzburg. Tie mi lernis kvar mondlingvojn: la latinan, la antikvan grekan kaj, en libervola kurso, Esperanton. La antikvaj lingvoj estis por mi nura peno, sed Esperanto malfermis al mi la vojon al rapida alproprigo de la nova lingvo por tuja uzo per korespondado kun samaĝulo en Kroatio. Kun la sama entuziasmo mi la postan jaron ekstudis mian kvaran „mondlingvon“, la anglan.

Mia pozicio kiel instruisto donis al mi la ŝancon doni kaj organizi Esperanto-kursojn, kaj mi koncentris mian agadon al regiona aktiveco, t.e.s al Baden-Virtembergo, la sudokcidenta federacia lando de Germanio. Por tiu celo mi iniciatis la fondadon de BAVELO (Baden-Virtemberga Esperanto-Ligo).

Mia konvinko estas, ke Esperanto tre utilus kiel saltobreto por meminiciate kaj proprametode lerni pliajn lingvojn. Tio povus komenci en la lerneja vivoperiodo kaj tre utilus, kiam en nia multlingva mondo la vivo (la profesia, la ama aŭ la turisma) kontaktigas nin neatendite kun alia, ĝis tiam al mi fremda kulturo kaj lingvo.

Tutmondo paciĝu per komunikado.



La festo de mia 85-a naskiĝdato en novembro 2025 en Gärtringen, Germanio. De maldekstre Edmilson Lima Serejo, brazilano, mi kaj Helgro Hölig de Esperanto-grupo en Böblingen.

7. Liba GABALDA (Ĉeĥio/Francio)



Mi naskiĝis la 22-a de majo 1949 en Ĉeĥoslovakio. Ekde la baza lernejo mi devige lernis la rusan lingvon, poste en la gimnazio la germanan. Dume mi malkovris Esperanton kaj en la loka klubo mi lernis ĝin. En aprilo 1967 mi sukcese finis la Esperanto-kurson. Poste mi aktivis en la loka klubo en la urbo Česká Třebová. Post la studado mi eklaboris je fervojo kiel oficistino. Mi ŝatis vojaĝi, kaj mia posteno multe favoris min.

En 1978 mi partoprenis en la 63-a UK en Varna, Bulgario, kie mi konatiĝis kun mia estonta edzo Floreal Gabalda. Post unu jaro ni geedziĝis kaj ekde 1980 ni ekloĝis en Karakaso, la ĉefurbo de Venezuelo, kie mia edzo ricevis postenon de profesoro en universitato.

Ni ambaŭ aktivis dum ses jaroj en Venezuela Esperanto-Asocio. Floreal fariĝis la vicprezidanto kaj mi, la kasistino. Tie ni ambaŭ instruis Esperanton kaj mi iniciatis la Esperanto-kronikon. En Venezuelo naskiĝis niaj du infanoj: la filino Belonia kaj la filo Ideal. Ambaŭ estas denaskaj esperantistoj.

Ĉar la situacio en Venezuelo malboniĝis, ni decidis reveni al Francio, la naskiĝlando de mia edzo. Kune ni partoprenis en multnombraj Esperanto-aranĝoj kun la infanoj.

Mi ŝatis foti kaj verki raportojn, kiuj estis aperigitaj en diversaj Esperanto-revuoj, ĵurnaloj, bultenoj ktp. Kun mia edzo mi ankaŭ propagandis Venezuelon per altiraj prezentoj kaj filmoj. Ni ambaŭ ŝatis koni kulturon de diversaj landoj kaj ĝui esperantistan etoson kun neforgeseblaj rememoroj. Esperanto kontribuas al la interkompreniĝo, amikeco, amo kaj paco.



Mia familio. Je mia malĝojo Floreal forpasis la 4-an de decembro 2024 en la aĝo de 78 jaroj.

8. Gérard kaj Jeannine LAYSEMAN (Francio)



Mi naskiĝis en 1946 kaj Gérard naskiĝis en 1941. Mi konis Gérard post vojaĝoj por handikapuloj organizitaj de Pastro Jako. Poste mi rilatis kun li kaj edziniĝis al li en 1975.

Mi malkovris Esperanton en nia tagĵurnalo, kiu prezentis esperantiston, kiu multe vojaĝis danke al Esperanto. Tiam Gérard diris al mi, ke li scias la lingvon. Li jam korespondis kun pluraj personoj kaj ĉefe kun Erin, novzelandanino. Ŝi venis al la 83-a UK en Montpeliero, Francio, en 1998, kie ni renkontis ŝin por la unua fojo.

Mi longe loĝas en la urbo Tours, kie loĝis fama esperantisto André Aude kaj invitis plurajn korespondantojn, do ni povis koni ilin. Inter ili estis Raita Pyhälä (Saliko, 1939 – 2025) el Finnlando kaj aliaj el Polando, Ĉinio, Bulgario kaj Ĉeĥio. Ni multe lernis de Saliko, kiu multe skribis pri Finnlando.

Kvankam Gérard havis handikapon kaj devis uzi rulseĝon, ni povis partopreni en diversaj Esperanto-kongresoj kaj aranĝoj. Tamen bedaŭrinde Gérard forpasis en decembro 2023, sed mi plu agadas por Esperanto. Vi vidu nian revuon « Turlanda Luko » https://esperanto-tours.legtux.org/. (Jeannine)

9. MBOMBA KULUBA Augustino (DR Kongo)



Mia patro MBOMBA KULUBA Augustino, kiu naskiĝis la 9-an de septembro 1961, loĝis en suda provinco Kivuo en DR Kongo. Li estis patro de sep geinfanoj.

Bedaŭrinde mia patro subite forpasis, kiam li vizitis kampon kaj trancîs malgrandajn herbojn. Li falis surteren, kaj post kelkaj minutoj li forpasis la 28-an de decembro 2025, havinte 65 jarojn.

En 1999 mia patro eklernis Esperanton kiel pacan helplingvon koresponde dank' al profesoro Hans Bakker el Amsterdamo, Nederlando. Tra tiu Esperanto-instruisto mia patro gajnis sufiĉe da Esperantaĵoj per poŝto, ĉar li estis vera amiko de Hans en Afriko.

Profesie, mia patro laboris en kelkaj ŝtataj societoj el Provinco Suda Kivuo, kaj plie kiel agrikulturisto. Krom tio, li tiel ŝatis nian komunan lingvon Esperanto, ke li decidis instrui ĝin al multaj homoj senpage. Plie, por diskonigi tiun lingvon en sia urbo Uviro, li fariĝis kunordiganto de Esperanto-Klubo “Uunio de Esperantistoj por la disvolviĝo de Uviro”. En Esperantujo li membriĝis en Esperanto-Civito. Lia rolo en tiu asocio estis delegito en la forumo de Civito en la Suda regiono Kivu.

En 2024 laŭ rekomendo de samlandano s-ro Honoré Sebuhoru mia patro amikiĝis kun germana portretistino s-ino Helga PLÖTNER, kaj ŝi subtenis lin per Esperantaĵoj kaj ankaŭ per nutrĵoj. Ni famiianoj orientigas niajn plej sinceraĵojn al la amata sinjorino Helga pro ĉion, kion ŝi faris por ni ! (Roberto MUFARIJI)



S-ro Augustin MBOMBA KULUBA, s-ino Élisabeth Guduel kaj d-ro Giorgio Silfer ambaŭ el Svisio dum esperanto-trejnado en Burundo en februaro 2024.

10. Ursula NIESERT (Germanio)



Mi naskiĝis en 1949 en nordgermania urbeto Rheine. Mi studis en Freiburg kaj Connecticut, Usono. Miaj studfakoj estis biologio kaj kemio. Profesie mi zigzagis tra pluraj spertoj: mi laboris kiel lerneja instruistino pri biologio kaj kemio, kiel komputila demonstristo-trejnisto, ankaŭ en malgranda hotelo kaj fine mi atingis mian revolaboron, oficiala por-Esperanta deĵoro ĉe Germana Esperanto-Asocio.

Post tiu dungiĝo mi, ne havante propran familion kun infanoj, povis dediĉi multan tempon al nia kara lingvo kaj mi faris tion ĉefe sur loka kaj regiona nivelo.

Kiel mi venis en kontakton kun Esperanto? Mi hazarde ricevis tiam tre konatan lernolibron verkitan de Hans kaj Wilhelm WINGEN. Ĝi estis tre sistematika, do taŭga por memlernado, sed tute ne instiga al konversacio. Tamen la facilaj sukcesoj dum la lernado de Esperanto multe logis min. Des pli, ĉar en lerneja lingvolernado mi ĉiam rapide atingis malbonajn notojn.

Post trimonata lernado mi kuraĝis viziti la germanan kongreson. Tie mi tuj estis kaptita de esperantisto, kiu alparolis min kaj ni sufiĉe profunde traktis temojn “pri dio kaj la mondo”, ĝis kiam mi post unu horo estis tute elĉerpita kaj petis ŝanĝi la konversacion al la germana. Mi estis profunde impresita. Per kiu alia lingvo oni povus havi tian superfortan sperton?


Finfine tiu sperto profunde ŝanĝis mian vivon. Ĝi donis al mi konfidon pri propraj kapabloj. Sed tiam mi ne konis iun alian esperantiston. Ĉu mi estas la sola? Ĉu ili fakte ekzistas?

Estis plia aventuro trovi esperantistojn en tempo SEN interreto. Kaj tiam paŝon post paŝo mi malkovris pli kaj pli pri Esperantujo, tiom multfaceta, tiom riĉa. Mi ankoraŭ esploras, mi daŭre lernas ĉiutage.



Amika Tago en Alsaco (Francio) junie 2024

11. Wolfgang SCHWANZER (Germanio)



D-ro Wolfgang Schwanzer (1953-2026) forpasis la 31-an de januaro 2026 post mallonga akuta malsano. Li estis multjara aktivulo en Germanio.

Li studis geografion en Frankfurto ĉe Majno, kie li diplomitiĝis kaj doktoriĝis. Ĝis pensiiĝo fine de la 2010-aj jaroj li laboris kiel oficisto de la germana federacia lando Hesio.

Li eklernis Esperanton kiel junulo. En 1989 li transprenis la prezidantecon de Germana Esperanto-Asocio (GEA), kiun li gvidis ĝis 1994. Dum tiu tempo Germanio reunuiĝis: kuniĝis ankaŭ la Esperanto-Asocioj el ambaŭ partoj de la lando per kontrakto subskribita en 1991. Tiun transiron li kungvidis atenteme kaj modeste kiel ĉiam.

Ekde 1996 li estis honora membro de GEA. En 1999 li transprenis la Esperanto-libroservon de la asocio. En la sama jaro li fariĝis ĉefdelegito de UEA por Germanio. Tiun oficon li plenumis ĝis la fino de 2025; la libroservon li planis daŭrigi kun plena energio.

Wolfgang partoprenis en multaj UK-oj. Fine de decembro pasintjare li kontribuis ankaŭ al la programoj de la Novjara Renkontiĝo en Wiesbaden kaj la GEA-renkontiĝo Luminesk' en apuda Bingen.


GEA perdis iaman gvidanton, la tuta Esperanto-komunumo, fidindan amikon. La entombigo kun ĉeesto de pluraj esperantistoj okazis la 12-an de februaro en Mainz. Ni kondolencas al lia vidvino Iris, liaj filoj kaj lia frato.

(Ulrich Brandenburg, el Esperanto aktuell 2/2026 N-ro 296)



De dekstre Wolfgang Schwanzer kun edzino Iris Leppert, Ada Florence Iracadukunda el Burundo kaj Manfred Westermayer dum la Eŭropa Kongreso en aprilo 2024.

12. Hamzeh SHAFIEE (Irano)



Mi estas Hamzeh Shafiee (Pron. Hamze Ŝafii), naskiĝinta en 1966 en Irano. Ĝis antaŭnelonge mi laboris kiel inĝeniero pri telekomunikado, sed mi nun ĝuas emeritecon, kiu permesas al mi dediĉi pli da tempo al miaj kulturaj pasioj.

Mia vojo kun Esperanto komenciĝis en 1985, kiam hazarda ĵurnalanonco pri la lingvo vekis mian scivolon. La unua libro, "Dua Lingvo", tuj konvinkis min pri la beleco, logiko kaj la idealisma spirito de la projekto, kaj ĝi fariĝis la komenco de vivodaŭra engaĝiĝo.


Dum la jaroj, miaj ĉefaj kontribuoj estis pri la kunfondado kaj agadoj de Irana Esperanto-Asocio, kaj redaktadon de la revuo "Irana Esperantisto". Krome, mi aktive partoprenis en la organizo de la unua nacia kongreso kaj mem gvidis plurajn bazajn kursojn de Esperanto, ĉiam klopodante transdoni mian entuziasmon kaj sperton al novaj generacioj de lernantoj.

Por mi, Esperanto ĉiam reprezentis multe pli ol nur lingvo; ĝi estas ilo por paca dialogo, tutmonda amikeco kaj profunda interhoma interkonekto. Ĝi donis al mi ne nur valorajn amikojn tra la mondo, sed ankaŭ vastan perspektivon pri homa kunlaboro kaj kompreniĝo. Tiu sperto donis al mi sencon de universala komunumo, pri kiu mi restas profunde dankema, kaj kiu daŭre inspiras mian agadon eĉ nun, en ĉi tiu nova kaj pli libera ĉapitro de mia vivo.



La 31-a de majo 2025, en la oficejo de Irana Esperanto-Asocio, ni festis renkontiĝon kun franca biciklista Esperantisto. Li intencis fari biciklan vojaĝon el Francio al Indonezio por partopreni la Internacian Junularan Kongreson. En la foto kune estas mi, la franca vojaĝanto, kaj la tiama prezidanto de la asocio. Tiu renkontiĝo estas bela simbolo de internacia amikeco kaj la aventura spirito de la Esperanto-komunumo.

13. Mramba SIMBA Nyamkinda (Tanzanio)



Mi naskiĝis la 20-an de aprilo 1961 en Bunda Distrikto norde de Tanzanio. Mia patrino mortis tuj post mia naskiĝo, do mi loĝis kun mia patro.

En la aĝo de 12 jaroj mi komencis iri al la bazlernejo, sed en la sekva jaro mi ne plu iris pro manko da mono. En 1976 mi iris piede al mia onklo en Kenio por peti lian helpon, sed bedaŭrinde li ne havis monon.

Poste mi iris al Najrobo, la ĉefurbo de Kenio, por trovi laboron. Post kelkaj tagoj en Najrobo mi trovis laboron ĉe hinda vesto-vendisto, kiun proponis min labori en sia vesto-kudrejo, kaj tie mi lernis vesto-kudradon kaj post 4 jaroj mi estis lerta tajloro, do mi revenis al Tanzanio, laborante kiel tajloro ĉe araba vesto-vendisto.

En 1983 mi trovis artikoleton pri Esperanto en la loka ĵurnalo. Mi skribis leteron al UEA por peti kurson, kaj de tiam mi eklernis Esperanton per koresponda kurso kaj per lernolibroj.

En 1988 mi partoprenis en ILEI-seminario kaj UK en Rotterdamo. Mi fondis Bunda Esperanto-klubon kaj iĝis prezidanto de Tanzania Esperanto-Asocio. Nun mi estas ĝia vic-prezidanto.

Per Esperanto mi faris plurajn prelegojn en 2007-2008 en Germanio, Nederlando, Belgio kaj Francio. Mi partoprenis en pluraj Esperanto-aranĝoj en Greziljono, SAT-kongreso en Parizo, Germana Esperanto-Kongreso en Essen, Esperanto Staĝo en Pluezec, Brita Esperanto-Kongreso en Dovro, UK-oj en Torino kaj Aruŝo. Dum la UK en Aruŝo mi ricevis premion Onisaburo Deguĉi,

Mi fondis lokan NRO “Mazingira”, kiu celas socialan kaj ekonomian bonfarton kaj mediprotektadon. Mi fondis Esperanto-mezlernejon en mia vilaĝo kaj tie mi instruas Esperanton al lernantoj. Por mi Esperanto estas mia vivo



14. SO Gilsu (Koreio)



Mi naskiĝis la 27-an de aprilo 1944.

Mi doktoriĝis en 1979 kaj ekde tiu jaro estis profesoro pri ekonomiko en la Universitato Sokyong en Seulo ĝis 2009.

Mi lernis Esperanton en 1966 kaj unue aktivis en la junulara movado, i.a. kiel prezidanto de Korea Esperanto-Junularo. Mi estis sekciestro de ILEI en Koreio kaj vicprezidanto de Korea Esperanto-Asocio.

En UEA mi estis komitatano kaj estrarano pri la azia agado kaj pri faka kaj scienca aplikado dum 1989-1995. Kiel estrarano mi redaktis la bultenon « Esperanto en Azio » dum 1990-1993 kaj fondis la Komisionon pri Azia Esperanto-Movado en 1994. Mi prelegis en la Internaciaj Kongresaj Universitatoj en Varno (1978), Brasilio (1981), Budapeŝto (1983), Varsovio (1987), Nitro (2016) kaj Torino (2023).

Mi aŭtoris la lernolibrojn : Kursolibro de Esperanto kaj Praktiko de Esperanto. Mi instruis Esperanton en koreaj universitatoj, Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) kaj Somera Kurso de Aŭstralio.

Mi havas Esperanto-familion: frato SO Jinsu (ekde 1969, nuna vicprez. de UEA), edzino YI Ungum (ekde 1973), du filoj SO Sangwon kaj SO Sanguk, denaskaj esperantistoj ekde 1976 kaj 1977, kaj partoprenis la nevo SO Junĉan en IIK (Torino) en 2023, la nevino SO Minsun en NASK en 2025.



En la jaro 2023, eldoniĝis “Festlibroj por la 80-jariĝo de SO Gilsu (1~8)” kiel « La 57-jara Praktiko de Esperanto », « Mondvojaĝo per kaj por Esperanto n-roj 1-3 », « Historio de Esperanto-movado el Albumo de SO Gilsu n-roj 1 kaj 2 » ktp.

Konklude kaj unufraze « **Esperanto igis min 'homarano'!** »

15. Mukunda WAGLE (Nepalo)



Mi naskiĝis la 28-an de februaro 1958 en Nepalo, kaj akiris doktoran gradon (PhD) ĉe Tribhuvan-Universitato en Nepalo. Mi instruis studentojn el diversaj kontinentoj en la sama universitato dum multaj jaroj.

En 1990 mi renkontis la polan esperantiston s-ro Joakim Werdin, kaj kune kun li mi organizis Esperanto-kursojn en Katmanduo, kie multaj partoprenis kaj sukcese lernis Esperanton.

Mi fariĝis la unua prezidanto de Nepala Esperanto-Asocio (NEspA) dum du sinsekvaj oficperiodoj. Mi ricevis instruistan trejnadon de ILEI, kaj dum la jaroj mi partoprenis en multaj Uk-oj kaj aliaj aranĝoj en la mondo. Je tiuj okazoj mi faris prelegojn pri lingvo, literaturo, folkloro kaj turismo en Nepalo en publikaj lokoj kaj universitatoj en Japanio, Islando, Francio kaj Usono.

Dum 25 jaroj NEspA organizas la Internacian Himalajan Renkontiĝon, en kiu esperantistoj el la tuta mondo partoprenis. S-ro Hori Jasuo el Japanio ĉeestis en ĝi pli ol 20 fojojn kiel granda motoro por ĝi kune kun siaj amikoj.

Mi verkis multajn librojn pri lingvo kaj literaturo, kaj ankaŭ multajn kantojn. Mi verkis tri librojn en Esperanto: "*Esperanto apud Everesto", "Bonvenon"* kaj *"Esperant Movado"*. Miajn kantojn vi povas ĝui en YouTube sub la nomo Mukunda Pathik. Ankaŭ infanaj kantolibroj kaj nepalaj kantolibroj estis publikigitaj de konataj eldonejoj.

Mi konatiĝis kun multaj esperantistoj okaze de la Himalajaj Renkontiĝoj kaj UK-oj, kio estas tre grava por mia vivo. Kun ili mi volas plu agadi por la movado kaj por la mondopaco, esperante brilan estontecon. Mi elkore salutas ĉiujn esperantistojn de la mondo.


Internacia Himalaja Renkontiĝo en 2018. Meze: Hori Jasuo kaj dekstr mi.

Galerio de Helga Plötner



Hundeto Gismo, 2019, pastelkreto



Tim kiu kato Murkel, pastelkreto, 1999



????



Helga staras antaŭ sia ateliero

1945: naskiĝis en Gräfenhainichen en la federacia lando Saksio-Anhalto en Germanio, kie mi loĝas ĝis hodiaŭ.
Ekde la 3a jariĝo pentris gaje.
Ekde la 14-jariĝo ekzercis portreti laŭ modeloj.
Ekde la 17-jariĝo estis membro en pentroklubo
1970: naskis la filinon Jana.
1974-1978: studis en Speciala Distrikta Kulturakademio de Halle/Saale kun la sukcesa diplomiĝo: gvidantino de Popola Artkreado por la fako pentroarto kaj grafiko.
1980: esperantistiĝis.
1988-1989: studis en la Altlernejo pri Arto en Dresdeno.
Post 1989 : instruis en diversaj artkursoj.
Pentris kiel liberprofesia portretpentristino homojn, pejzaĝojn, florojn, bestojn kaj domojn laŭ modeloj aŭ laŭ fotoj.
Pentris je privataj komisioj.
Havis ekspoziciojn kiel membro de la "Ligo pri Pentroarto kaj Grafiko" en la Lutherurbo Vitenbergo.
Instruis interesiĝantojn en kursoj kaj private en la propra ateliero.
Nun : paŭzas pro malbona sanstato.

Ekde esperantistiĝo en 1980 portretadis enlandajn kaj eksterlandajn geesperantistojn. Tiujn pli ol 270 originalajn portretojn mi donacos al la NACIA ESPERANTO-MUZEO en VIENO por estontaj generacioj. Ĉiam mi laboras kun **KREDO, AMO** kaj **ESPERO por PACO**.

Ekspozicioj: Internacia Somera Esperanto-Universitato en Bulgario en 1986,
UK-oj en Varsovio 1987 kaj en Berlino 1999.
Germana Esperanto-Kongreso en Hameleno en 2015 ktp.
Libroj : « Esperanto por mi - 16 geesperantistoj portretitaj de Helga Plötner » n-roj 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9, 10 kaj 11 eldonitaj de HORIZONTO.
« Mia pentrista vivo por Esperanto kaj por paco » kaj « "Biografio de Helga Plötner, kiu portretis 250 esperantistojn » eldonitaj de HORIZONTO.

Esperanto por mi 11

16 geesperantistoj portretitaj de Helga Plötner

「私にとってのエスペラント　11　－ ヘルガが描いた 16 人のエスペランチスト －」

La unua eldono : la 24-an de julio 2026　初版発行：2026 年 1 月 24 日
La aŭtoroj: Helga Plötner kaj 16 geesperantistoj　著者：Helga Plötner ほか
La portretoj kaj pentraĵoj: Helga Plötner　肖像画・挿絵： Helga Plötner
Ateliero de pentroarto kaj grafiko de Helga Plötner:　ヘルガの連絡先
Friedrich-Ebert-Str. 9, 06773 Gräfenhainichen, Germanio
Tel. +49173 7731545, Retadreso: helga.ploetner@gmx.de
Provlegis : John HUANG (Ĉinio, Kanado)　校正：Huang（中国、カナダ）
~~Maurizio GIACOMETTO (Britio)~~　~~Maurizio（イギリス）~~
Eldonejo: Horizonto: 2-13-3 Ootone, Maebaŝi, Gunma, Japanio, 371-0825
Telefono/Fakso: 81-(0)27-253-2524 Retadreso: hori-zonto@r.water.sannet.ne.jp
発行所：ホリゾント出版　371−0825 群馬県前橋市大利根町 2－13－ 3
Ĝirkonto: 00110-2-133056 堀泰雄　振替口座：00110-2-133056 堀泰雄
Prezo: 5 eŭroj　定価 :500 円　注文はホリゾント出版へ
Mendo : Libroservo de UEA libroservo@co.uea.org aŭ Eldonejo Horizonto
ISBN: 978-4-939088-76-6 C1095 500E

Enhavo

1. Raia ANDROVSKA (Bulgario)
2. Olga BAUER (Skobeeva) (Ukrainio)
3. Zdravka BOYTCHEVA (Bulgario)
4. Miguelángel BUENO ÂVILA (Hispanio)
5. Jindřiška DRAHOTOVÁ (Ĉeĥio)
6. Alois EDER (Aŭstrio/ Germanio)
7. Liba GABALDA (Ĉeĥio/Francio)
8. Gérard kaj Jeannine LAYSEMAN (Francio)
9. MBOMBA KULUBA Augustino (DR Kongo)
10. Ursula NIESERT (Germanio)
11. Wolfgang SCHWANZER (Germanio)
12. Hamzeh SHAFIEE (Irano)
13. Mramba SIMBA Nyamkinda (Tanzanio)
14. SO Gilsu (Koreio)
15. Mukunda WAGLE (Nepalo)
16. Galerio de Helga PLÖTNER

Saluto de la portretistino



Post la unua ruĝkovrila, la dua verdkovrila, la tria blukovrila, la kvara oranĝkovrila, la kvina lazurkovrila, la sesa flavkovrila, la sepa rozkovrila, la oka violkovrila, la naŭa helverdkovrila, la deka blankkovrila ni povas prezenti al vi la dekunuan rozkolorkovrilan libron.

Danke al ĉiuj portretitoj mi akiris novajn geamikojn mondvaste, sekve interesan, riĉenhavan leteramikecon. Mi amas vin ĉiujn agantojn por la estonteco de Esperanto kaj por PACO. Ni kunlaboru! Kun admiro mi demetas mian verdan ĉapon pro viaj aktivaj agadoj.

Mi, nun 81-jara handikapulino kun kronikaj doloroj kaj problemegoj, sukcesis portreti kun kuraĝa, forta VOLO ankaŭ por tiu ĉi 11-a libro en FIDO, KREDO, AMO, ESPERO kaj ĜOJO.


ESPERANTO VENKU IAM TUTMONDE por ke unu komprenu la alian en bona etoso! ESTU NEPRE PACO, PACO, PACO tutmonde!

Mi donacis/os ĉiujn originalajn portretojn de geesperantistoj al la Nacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Demandu tie pri Helga Plötner kaj pri la 11 libroj kaj portretoj. Demandu ankaŭ pri la libro "Mia pentrista vivo por Esperanto kaj por Paco!" kaj "Biografio de Helga Plötner, kiu portretis 250 esperantistojn", ambaŭ de eldonejo HORIZONTO, Japanio.

Mi dankas tutkore la iniciatinton, kompilanton kaj eldonanton s-ron HORI Jasuo el Japanio kaj la provleganton s-ron John HUANG el Kanado.

Helga Plötner

Prezo: 5 eŭroj　　定価：500 円
ISBN: 978-4-939088-76-6 C1095 500E



Libroj de Helga Plötner

HORIZONTO

